

Eduard Štorch kaj Antonín Zhoř

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 4-an de novembro 2015

Enkoduko

Instruistoj de nia lando ekde mezepoko apartenis al la plej edukitaj loĝantoj de urboj kaj vilaĝoj. Ili ofte ne estis riĉuloj, sed oni scias el dokumentoj kaj beletro, ke la instruisto kun loka pastro aŭ pastoro, apotekaristo aŭ kuracisto kaj advokato prezentis intelektularon de loka loĝantaro.

En la 18-a jarcento sukcesa instruisto ne nur instruis en lernejo, sed ankaŭ kantis (pro tio sinonimo de „instruisto“ estas „kantoro“) kaj organizis kaj gvidis preĝejan ĥoron. Li sciis ludi unu aŭ kelkajn muzikajn instrumentojn kaj iam eĉ mem komponis muzikon. Se liaj najbaroj volis decidi pri iu jura afero aŭ traduki fremdlingvan tekston, ili ofte petis la instruiston, por ke li helpu kaj konsilu. Signifo de instruistaro ekkreskis en la 19-a jarcento, kiam baze de nova asocia leĝo (el la 15-a novembro 1867) estis fondataj multe da sportaj, literaturaj, natursciencaj kaj patrujsiencaj societoj kaj kluboj. Tiam la instruistoj fariĝis, se ne rekte ĉefaj fondantoj, do almenaŭ sekretarioj, perantoj kaj helpantoj de novaj societoj. Ili ofte servis kiel urbaj aŭ vilaĝaj kronikistoj.

Krome financaj problemoj la instruistoj precipe en kritikaj situacioj devis solvi konfliktojn inter propra konscio kaj postuloj de reganta reĝimo. Oni povas trovi multe da ekzemploj ne nur el epoko de aŭstro-hungara monarĥio, sed ankaŭ el periodo de nazia okupado (1939-1945), socialismo (1948-1989) kaj soveta okupado de nia lando (1968-1991), kiam la instruistoj ofte devis aŭ instrui siajn lernantojn tion, je kio ili mem ne kredis, aŭ forlasi lernejon kaj ĉesi sian profesion.

Mia prelego temas pri du instruistoj, kiuj signife influis kelkajn generaciojn de nia junularo.

Eduard Štorch (10. 4. 1878 Ostroměř u Hořic - 25. 6. 1956 Prago)

Eduard Štorch estis ĉeĥa pedagogo, verkisto kaj arĥeologo. Li naskiĝis la 10-an de aprilo 1878 en Ostroměř apud Hořice, kiel la tria filo. Lia patro deĵoris ĉe vapora maŝino en akvopreparejo kaj lia patrino zorgis hejme pri lia pli juna frato Gustav. La familio kvarfoje translokiĝis – en vilaĝojn Všeřtary, Studánky, Radim apud Jičín kaj Josefov. Kiel lernanto de la kvara klaso Eduard ŝatis legi. Li lernis ludi violon kaj eĉ verkis sian unuan rakonton pri maraj fiŝkaptistoj. Li konsideris tiun periodon la plej feliĉa parto de sia juneco.

Kiam li en la jaro 1889 eklernis en teĥnika linceo en Hradec Králové, li havis problemojn kun desegnado kaj germana lingvo. Sed bonŝance li havis bonan ĉefan instruiston de la klaso, kiu estis rigora matematikisto, sed post instruado amuziĝis kun siaj lernantoj kiel ilia bona amiko. Tiam Štorch, jam kiel 15-jara studento, decidis fariĝi instruisto.

En la jaro 1893 li ekstudis en Ĉeĥa Instituto por Edukado de Instruistoj en Hradec Králové. Tie li pliboniĝis precipe en ĉeĥa lingvo kaj ageme partoprenadis en ĉiuj studentaj agadoj.

Post fino de studado li instruis en baza lernejo en Třebechovice. En la jaro 1898 li publike parolis en kongreso de konsiloj de Progresema Partio pri signifo de instruistaro kaj la 5-an de julio 1899 ĉe Hořice li arde parolis pri Majstro Johano Hus (1371?–1415).

Pro sia patriota aktiveco kaj kontribuado al ĵurnaloj li estis translokitita en Lhota Malšova kaj poste en Dobrá Voda.

„Kion ni faru kun tiu nekonforma instruisto?“, pensis aŭstraj oficistoj. „Ni sendu lin en Regionon Most, kie neniu volas loĝi kaj instrui!“ Tial Štorch komencis instrui en Hostomice apud Bílina kaj poste, kiel helpanta instruisto, en la urbo Most. Li verkis sociologan studion „Socia Situo de Infanoj en Nordbohemia Karboekspluata Distrikto“. En sia studio li prezentis landon damaĝitan de surfacaj minejoj de bruna karbo kaj kun poluita aero, sed ankaŭ plendis pri neglektitaj infanoj, kiuj malbone kondutas, baldaŭ ekfumias, trinkas alkoholon kune kun adoltaj personoj, mensogas, trompas kaj senskrupule ŝtelas, ekzemple eĉ poŝhorloĝon de la instruisto. Iliaj gepatroj edukas ilin nur per batado. La infanoj bone scias, ke la instruisto ne devas ilin bati, kaj tial ili lin ne obeas. Kaj ĉu vi kapablas imagi vivkondiĉojn de la infanoj? Sur planko devas dormadi 12 % da infanoj, ĉar ili ne havas litojn. Ne matenmanĝadas 18 % da infanoj kaj ne tagmanĝadas 50 % da infanoj. Plimulte da infanoj loĝas en unu ĉambro multe da homoj (5 – 14 personoj), ofte kune kun malsanuloj.

Sed Štorch ne nur kritikis, sed laŭvorte ekbatalis kontraŭ vent-muelejoj, kiuj estis materiala kaj morala mizero kaj burokratoj. Laŭ lia opinio la infanoj bezonas precipe movadon. Ĉar li sincere volis helpi al la infanoj, li en sia propra libera tempo promenadis kun ili kaj pripensis por ili multe da agadoj. Pro tio li havis sukcesojn eĉ en malbonaj kondiĉoj de la regiono. Sinsekve li eksciis, ke sistemo de instruado estas bazita nur je meĥanika memorado, sed ne evoluigas observadon kaj volon de lernantoj.

Pro siaj publikaj aktivecoj li estis en la jaro 1903 eĉ antaŭ rigardantaj lernantoj forkondukita el lernejo, kie li ĵus instruis, en landestrejon kaj ekzamenita kaŭze de ribeligado de loĝantaro. Tiam savis lin nur ĉeĥa protokolisto, kiu skribis protokolon por ke helpi al li. Štorch estis liberigita, sed aŭstraj oficistoj devigis lin foriri el la regiono.

Ekde la jaro 1903 li instruis en Prago krom du jaroj post la unua mondmilito, kiam li estis en Bratislava. Lia hobio estis arĥeologio, tial li ne nur en sia libera tempo studis fakan literaturon, sed ankaŭ mem esploris kreante ekde la jaro 1906 sian propran arĥeologan kolekton.

La 27-an de aprilo 1907 li edziĝis kun Božena Vávrová. Ili travivis belan edzecon, sed ne havis infanojn.

En la jaro 1914 li soldatiĝis kaj fariĝis laboristo de Ruĝa Kruco en rentgenologia departamento de malsanulejo en Prago-Karlín. En la jaro 1918 li evitis transporton al fronto kaj eklaboris en Instituto de Jedlička kaj Bakula kiel fotisto.

Post la unua mondmilito Štorch fariĝis por mallonga tempo direktoro de infana rifuĝejo, sed kaŭze de nekunlaboro de oficistoj li rezignis kaj eklaboris en Bratislava kiel regiona lerneja subinspektoro. En Slovakio li kritikis katolikan eklezion kaj tial devis foriri. Post du jaroj li revenis en Pragon, kie instruis en Prago-Libeň, Prago-Bubny kaj poste en knaba mezlernejo en Strato Jindřišská en centro de la ĉefurbo.

En la jaroj 1926-1934 li estis estro de tiel nomata Infana Farmo en Prago-Libeň. Por tiu projekto li luis parton de Insulo de Libeň en Vultavo. Li havis nek sufiĉe da mono nek sponzorojn. Tial li la 7-an de aprilo 1926 vendis al Nacia Muzeo en Prago sian propran arĥeologan kolekton, kiun li kolektis 20 jarojn (1906-1926). Krom tio li devis batali kontraŭ pragaj burokratoj.

Štorch propagadis eŭbiotikon (sanan vivstilon). En la lernejo en Infana Farmo li instruadis subĉiele, nur dum malbona vetero en kovrita verando. Li permesis al infanoj du tagojn spontane amuziĝi kaj nur poste li ekkunlaboris kun kelkaj infanoj, kiuj jam volis

kunlabori. Al tiu rondeto sinsekve alvenis aliaj infanoj kaj fine kunlaboris ĉiuj. Liaj metodoj havis miraklan efikon. La infanoj ne timis, ke ili estos pune retenitaj post studado, sed ke ili estos pune senditaj hejmen. Štorch volonte montris sian infanan Farmon al specialistoj kaj aliaj gastoj. Lian Farmon persone vizitis eĉ la unua prezidento de Ĉeĥoslovaka Respubliko Tomáš Garrigue Masaryk (1850–1937). Sed en la jaro 1934 Štorch devis doni la arealon al ĉefurbestaro, ĉar pragaj burokratoj venkis.

Projekto de granda eŭbiotika setlejo Růžičkov en Prago-Trója fiaskis en la jaro 1930, ĉar mankis mono.

En la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento Štorch estis la unua instruisto en nia lando, kiu aranĝis skiajn kursojn por infanoj. Pro granda sukceso li ripetadis la kursojn ĝis la jaro 1935. Li ne apartenis al riĉuloj, sed estis filantropo, kiu eĉ finance apogis infanojn el malriĉaj familioj, por ke povu partopreni en la kursoj.

Alia novaĵo estis restadoj de pragaj infanoj en Jugoslavio. Sed la restadoj ne temis nur pri banado en la maro! La infanoj lernis kroatan (slavan) lingvon kaj estis edukitaj ankaŭ en morala senco. Por la tendaro Štorch bezonis helpantojn, sed laŭ li ne ĉiu povis labori kun infanoj. Li havis specialajn postulojn. Gegvidantoj de infanoj devis esti abstinentoj kaj nefumantoj, nemigruloj, kantistoj aŭ muzikistoj, 20-35-jaraj, spertuloj, sanaj (sen depresioj kaj neŭrozoj), bonhumoraj, laboremaj, lernemaj, afablaj kaj inteligentaj. Kompreneble ili devis obei Štorchon.

En la jaro 1928 Eduard Štorch dediĉis ĉiun sian liberan tempon al junularo kaj pro tio kaŭze de elĉerpigo de siaj fortoj psiĥike kolapsis. Kiam li en la jaro 1930 ricevis definitivan instruistan laboran rangon, li aĉetis someran domon en vilaĝo Lobeč apud Mělník. Tie li kun sia edzino ĉiudimanĉe ripozadis kaj verkadis.

Instruisto Štorch volis reformi instruadon de historio en ĉeĥoslovakaj lernejoj. Li skribis: „Faktoj apartenas al instruado de historio, sed nur kiel funkciaj komponantoj de dinamika mekanismo, kiu estas direktita per pensado, kaj kiel helpilo por kreado de historia bildo... (...) Hazardaj sonoj ne estas muziko kaj simfonio, amaso da ŝtonetoj ankoraŭ ne signifas mozaikan bildon, plenmano de rondetoj kaj ŝaftetoj ankoraŭ ne estas horloĝo, libro, kiu nur estas plenita per historiaj faktoj ankoraŭ ne estas historio. Certe sen la sonoj ne estas la muziko, sen la ŝtonetoj ne estas la mozaiko, sen la rondetoj ne estas la horloĝo kaj sen historiaj faktoj ne povas ekzisti la historio.“

Tial li kune kun Karel Čondl (1900–1977) en la jaro 1935 eldonis trivoluman lernolibron de historio „Labora Lernolibro de Historio por Mezlernejoj“, kiu estis progresema, sed kaŭzis multe da polemikoj. Ĝi ne plaĉis precipe al katolikaj eklezianoj, ĉar en ĝi estis priskribita peno de la eklezio uzurpi politikan potencon. En la jaro 1936 katolikoj pere de deputisto de Ĉeĥoslovaka Popola Partio eĉ interpelaciis kontraŭ la lernolibro en ĉeĥoslovaka Parlamento.

Tial Štorch verkis librojn pri pasinteco, precipe pri pratempo kaj antaŭkristana historio de slavoj, en kiuj li rakontis pri niaj antaŭuloj uzante majstran stilon de ĉeĥa lingvo. Plimulte da liaj libroj ilustris fama moravia pentristo Zdeněk Burian (1905-1981).

Krome arĥeologio apartenis al hobiaj de Eduard Štorch ankaŭ etnografio kaj biologio.

Por bona kompreno de konduto de prahomoj li studis verkaĵojn pri primitive vivantaj homoj de sia epoko, ekzemple pri indianoj, kiujn priskribis fondanto de etnografia muzeo en Prago Vojtěch Náprstek (1826–1894). Štorch amikiĝis kun plejado de niaj bravaj vojaĝantoj, al kiuj apartenis Emil Holub (1847-1902), Alois Musil (1868-1944), Zdeněk

Matěj Kuděj (1881-1955), Otakar Batlička (1895-1942), Jan Eskymo Welzl (1868-1948), Alberto Vojtěch Frič (1882–1944) k.a.

En arĥeologio li bedaŭrinde estis nur aŭtodidakto. Siajn amatorajn arĥeologiajn esplorojn li faris en Prago kaj en ĉirkaŭaĵo de Lobeč en Regiono Mělník (centra Bohemio), sed spite de lia klopoda kaj sinoferema laboro profesiaj arĥeologoj neniam lin akceptis, ĉar li estis pli sukcesa entuziasma rakontanto kaj verkisto ol sciencisto.

La 31-an de decembro 1935 li kiel gvidanto de skia kurso havis akcidenton. Germana skiisto Gerhard Schwarz el Brno veturpuŝis kontraŭ li kaj du infanoj. Kaŭze de fizikaj kaj psiĥikaj postsekvoj de la akcidento Štorch estis en la jaro 1937 duonemeritigita kaj en la jaro 1939 li fine emeritiĝis.

Dum la dua mondmilito li, jam pensiulo, okupiĝis pri verkado de rakontoj el pratempo, sed kaŭze de cenzuro li povis eldoni preskaŭ nenion. Dum Kristnasko en la jaro 1940 lia dekstra okulo blindiĝis. Sed Štorch kontinuus sian verkadon. Nova reĝimo post komunisma puĉo en la jaro 1948 senskrupule konfiskis lian someran domon en Lobeč kaj duonon de lia loĝejo en Prago. Lia edzino post operacio en la jaro 1949 ne povis plu iradi, pro tio Štorch pri ŝi zorgis. Li ofertis siajn kolektojn, verkaĵojn, librojn, manuskriptojn, korespondaĵon kaj diapozitivojn al Patrujsciencia Muzeo en Hořice, kiu ilin akceptis en la jaro 1954. Lia sanstato rapide plimalboniĝis kaj li la 25-an de junio 1956 mortis.

En la jaro 2010 estis fondita Muzeo de Eduard Štorch en Lobeč.

Libroj de Eduard Štorch

Disĉiplo de Sorĉisto – Čarodějův učedník (1910);

Bravulo Vratislao – Bohatýr Vratislav (1918);

Mamutĉasantoj – Lovci mamutů (1918) – pri prahomaro;

Libuše kaj Premislo – Libuše a Přemysl (1919) – pri mitaj fondantoj de dinastio Premislidoj;

En Duonlumo de Pratempo – V šeru dávných věků (1920);

Setlejo de la Etno Frugilegoj – Osada Havranů (1930) – rakonto el neolito;

En Ĉasistaro – V lovecké tlupě (1931);

Bronza Trezoro – Bronzový poklad (1932);

Ĉe Granda Rivero – U Veliké řeky (1932);

Rompita Glavo – Zlomený meč (1932) – pri markomana reĝo Marobudus, kiu volis krei en nia lando markomanan ŝtaton laŭ romia modelo;

Sur Skolta Pado – Junáckou stezkou (1934);

Voko de Etno – Volání rodu (1934);

Mamutĉasantoj Ankoraŭ post Kvin Jaroj – Lovci mamutů ještě po pěti letech (1939);

Por Děvín kaj Velehrad – O Děvín a Velehrad (1939);

Haltigita Lavango – Zastavený příval (1940);

Kuraĝa Juneco – Statečné mládí (1946);

Glavo kontraŭ Glavo – Meč proti meči (1947);

Heroo Nik - Hrdina Nik (1947) – pri gerilaj defendaj bataloj de slavoj kontraŭ avaroj kaj frankoj;

Minehava (1950) – pri fino de matriarkeco.

Antonín Zhoř (18. 1. 1896 Rosice — 31. 3. 1965 Brno)

Antonín Zhoř, moravia instruisto, verkisto, redaktoro kaj eldonisto, naskiĝis la 1-an de januaro 1896 en Rosice apud Brno. Lia patro estis tajlora majstro. Lia patrino Flora, fraŭlinnome Štikarová, estis filino de urba sekretario. Antonín lernis en baza lernejo, poste tri jarojn en mezlernejo kaj fariĝis instruista helpanto. Ekde la jaro 1910 li studis en instruista instituto en Brno. Unu jaro li instruis en baza lernejo en Oslavany. Rosice kaj Oslavany apartenas al industria kaj minista regiono de suda Moravio.

La unua mondmilito (1914–1918) signifis intermiton de trankvila instruista laboro. Juna instruisto Zhoř devis forlasi lernejon kaj siajn lernantojn kaj ekservi en aŭstro-hungara armeo. Lia regimento estis baldaŭ forsendita en rusan fronton. Sed moraviano (slavo) Zhoř ne volis batali kontraŭ rusoj, kiuj parolas similan (slavan) lingvon. Tial li volonte kaptigis kaj fariĝis ĉeĥoslovaka legiano.

Ekde la jaro 1918 li instruis en Brno. En la jaro 1926 li eldonis aŭtobiografan romanon *Survoje al Libereco* (Cestou ke svobodě) sub la pseŭdonimo Pavel Čermák. Ĉefa sceno de la romano estas renkontiĝo de vundita legiano kun venonta ĉeĥoslovaka prezidento Tomáš Garrigue Masaryk en lazareto post batalo apud Zborov (la 2-an de julio 1917), kie rusoj subgvide generalo Brusilov kaj kun helpo de ĉeĥoslovakaj legianoj venkis aŭstro-hungaran armeon. Danke al siaj personaj spertoj el rusa militkaptejo Zhoř rusojn en sia romano *Survoje al Libereco* ne idealigis. Ekzemple rusa komandanto de militkaptita barakaro estas priskribita kiel alkoholulo kaj koruptulo, kiu senskrupule profitas de milito kaj mizereco de militkaptistoj.

Zhoř sciis, ke infanoj bezonas bonajn librojn. Sed kvalitaj libroj tiam estis tiel multekostaj, ke multe da infanoj (eĉ lernejoj) ne povis ilin aĉeti. Tial Zhoř en la jaro 1929 fondis sian propran eldonejon. Nomo de la eldonejo estis „Epos“ („Eposo“). Li eldonis librojn baze de abono, por ke ili ne estu multekostaj. Tuta lia familio helpis al li, sed liaj fortoj baldaŭ ekmankis. La eldonejo „Epos“ tial estis unuigita kun eldonista sekcio de Centra Asocio de Instruistaj Unuiĝoj kaj ekestis eldonejo de Antonín Zhoř „Jitro“ („Mateno“). Nova eldonejo funkciis eĉ spite de nazia okupacio ĝis la jaro 1948, kiam ĝi estis konfiskita de komunistoj. Ambaŭ eldonejoj (Epos kaj Jitro) eldonis dum 18 jaroj 73 librojn. La eldonkvanto sumis 300 000 ekzemplerojn. Antonín Zhoř, kiu estis eldonisto, redaktoro, lektoro kaj propagandisto, estis tre rigora kaj neniam cedis kvaliton de siaj libroj.

Antonín Zhoř estis ankaŭ redaktoro de ĵurnaloj por infanoj. En la jaroj 1937-1942 kaj 1945-1949 li redaktis monatgazeton „Vlaštovička“ („Hirundeto“). En libroeldonejo „Knihovna Vlaštovičky“ („Biblioteko Hirundetoj“) estis eldonitaj 19 fabelaroj (637 ekzempleroj).

En la jaroj 1945-1949 Zhoř redaktis ankoraŭ ĵurnalon por infanoj „Brouček“ („Skarabeto“). Humurajn rakontojn por infanoj li publicis en ĵurnaloj kaj nur post sukceso je infanoj kreis de ili librojn.

En sia romano *Honestulo Abe* (1939), kiu estis verkita en komenco de nazia okupado, Zhoř esprimis siajn pensojn pri valoro de libereco kaj humana digneco. La romano temis pri usona prezidento Abraham Lincoln (1809-1865).

En biografiaj romanoj li prezentis al junularo sortojn de fizikistino Marie Curie-Skłodowska (1867-1934), komponisto Ludoviko van Beethoven (1770-1827), pentristo

Jaroslav Čermák (1831-1878), verkistino Božena Němcová (1820?-1862), verkisto Alois Jirásek (1851-1930) kaj Charlotta Garrigue Masaryková (1850-1923).

Lia filo Igor Zhoř (1925–1997) fariĝis vidartista, profesoro de la Pedagogia Fakultado de la Universitato Masaryk en Brno, peranto de multe da vidartaj ekspozicioj, kaj en lasta jaro de sia vivo ankaŭ dekanato de la Fakultato de Vidartoj de la Tehnika Universitato en Brno.

Antonín Zhoř mortis en la jaro 1965 kaj estas entombigita en Centra tombejo en Brno.

Libroj de Antonín Zhoř:

Per Vojo al Libereco – Cestou ke svobodě (1926) – aŭtobiografia rakonto pri legianoj;

Limgardistido – Hraničářův syn (1930);

Pri Virino kun Brava Koro – O ženě s hrdinským srdcem (1933) – pri Charlotta Garrigue Masaryková;

Nevidebla Tonĉjo – Neviditelný Toník (1935);

Kiel Mi Komencis – Jak jsem začínal (1938);

Honestulo Abe – Poctivý Abe (1940);

La etulo Alois Jirásek – Když byl Alois Jirásek maličký (1941);

Mia Virhundo Jaryk – Můj pes Jaryk (1941);

Pri Honesta Kavaliro kaj Fia Perfido – O světlém rytíři a černé zradě (1942);

Fabelo pri Paneto – Pohádka o chlebičku (1942);

Mirindaj Rakontoj de Barono Münchhausen – Podivuhodné příběhy Barona Prášila (1943);

Monumento de Lukto por Vivo de la Nacio – Památník boje o život národa (1946);

Disĉiplo de Mago Čáryfuk – Učedník kouzelníka Čáryfuka (1946);

Dornjo kaj Piratoj – Dorotka a mořští loupežníci (1946);

Pri Štylfrýd kaj Bruncvík – O Štylfrýdovi a Bruncvíkovi (1946);

Fabeloj de Mil kaj Unu Nokto – Pohádky tisíce a jedné noci (1947);

Obstina Maria – Tvrdohlavá Marie (1947) – pri Marie Curie-Skłodowska;

Rememoroj pri Lernojaro 1946/47 – Vzpomínky na školní rok 1946/47 (1947);

Tio estis nenio – To nebylo nic (1948) – pri gerilanoj en Bohemia-Moravia Montetaro;

Nigra Bob kaj Blanka Bob – Černý Bob a bílý Bob (1958);

Sola kontraŭ Sorto – Sám proti osudu (1962) – pri Ludoviko van Beethoven;

Betty (1963) – pri juneco de Božena Němcová;

Maristo Joĉjo kaj Simieto RRRa – Námořník Pepík a opička RRRa (1963);

Lama Skermisto – Kulhavý šermíř (1966) – pri pentristo Jaroslav Čermák.

Konkludo

Eduard Štorch kaj Antonín Zhoř estis modestaj homoj, pri kiuj nia socio nun forgesas. Sed ili kaj multe da aliaj similaj instruistoj signife influis kelkajn generaciojn de infanoj.

Rekomendita literaturo

- BEZRUČ, P. 1970: Kantoro Halfar, paĝoj 27-28. En: KNOBLOCH, Č. (ed-o): Sileziaj kantoj. 1-a eld., Opava, Památník Petra Bezruče kaj la sekcio MEM de Ĉeĥoslovaka Esperanto Asocio, 121 paĝoj.
- CRKAL, K. 1983: Lovec kaktusů [A.V. Frič], 1-a eld., Prago, Academia, 432 paĝoj.
- DYTRYCH, J. 2007: Antonín Josef Zhoř. In *Rosice 100 let městem : 1907–2007 : Almanach sestavený u příležitosti 100. výročí povýšení Rosic na město*. Rosice : Kulturní informační centrum Rosice, [2007]. Retadreso: <http://www.kic.rosice.cz/cs/kultura-a-volny-cas/osobnosti-rosicka/antonin-zhor>. ISBN 978-80-254-0997-8. paĝoj 299–300.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1997: Toulky českou minulostí. 1-a eld., Prago, Baronet kaj Via Facti, 230 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2007: Toulky českou minulostí. 1-a eld., Prago, Via Facti, 221 paĝoj.
- ŠTORCH, E. 1955: V šeru dávných věků. 3-a eld. Prago, Státní nakladatelství dětské knihy, 145 paĝoj.
- ŠTORCH, E. 1974: Minehava. 1-a eld. Bratislava, Mladé letá, 283 paĝoj.
- ŠTORCH, E. 1978: Zlomený meč. Povídka o markomanském králi Marobudovi. 2-a eld., Prago, Albatros, 165 paĝoj.
- ŠTORCH, E. 1982: Osada Havranů. 6-a eld., Prago, Albatros, 125 paĝoj.
- ŠTORCH, E. 1983: Lovci mamutů. 5-a eld., Prago, Albatros, 299 paĝoj.
- ZHOŘ, A. 1947: To nebylo nic. 1-a eld., Prago, Mladá Fronta, 124 paĝoj.
- ZHOŘ, A. 1967: Sám proti osudu. Vyprávění o životě Ludvíka van Beethovena. 2-a eld., Prago, Státní nakladatelství dětské knihy, 279 paĝoj.
- ZHOŘ, A. 1978: Tvrdohlavá Marie. 3-a eld., Prago, Albatros, 163 paĝoj.